RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
25/02/2016 07:49:24

Kubo kaj la Eŭropa Unio intertraktos pri politika dialogo kaj kunlaboro.

La 3-an kaj 4-an de marto okazos en Havano la sepa rondo de intertraktado inter Kubo kaj la Eŭropa Unio pri interkonsento de politika kaj kunlabora dialogo, informis la delegitaro de la EU.

Dum la renkontiĝo ili pritraktos la artikolojn pendantajn de la ĉapitroj de politika dialogo kaj kunlaboro, samkiel la instituciajn dispoziciojn kaj ĝeneralajn provizaĵojn de la interkonsento, precizigas gazetara komuniko de la diplomatia reprezentanto de la EU en Kubo, laŭ informas la agentejo Prensa Latina.

La delegitaro eŭropa estos prezidita de la ĝenerala sekretario adjunkta por ekonomiaj kaj tutglobaj aferoj de la eŭropa servo de ekstera agado, Christian Leffler, kaj flanke de Kubo estos la vicministro pri eksteraj rilatoj Abelardo Moreno.